## Kial mankas Historia Esperantlingva Literaturo

Antauparolo al "Skizoj kaj Fragmentoj el la Historio - Originala Historia Verkado pri Historiaj Temoj"

G. KALKHOFF (DE)

Traserĉante la ampleksan Esperanto-literaturan liston, oni unuavide atentas certan mankon, kiu koncernas specialan fakon aŭ sciencon; tio estas la historio, la scienco kiu okupiĝas je la pasinteco, la scienco retrorigardanta al niaj prauloj, al iliaj vivkonstancoj, al iliaj agadoj, al iliaj kulturaĵoj.

Kial tiaj libroj mankas? Kial escepte de kelkaj libroj, politike emfazaj, la sistema kaj objektiva historia verkado ne troviĝas inter la multspecaj Esperanto-literaturo?

Oni povas cerbumi pri tiu problemo, verŝajne ne nur neglektita sed ankaŭ tute malkonvena, ĉar ĝi tuŝas nek la motivojn nek la sencon de la Esperanto-idearo. Eble ĝi memorigas naciismon, homan malperfektecon aŭ eĉ krimecon; tiuj proprecoj ja kontraŭstaras al niaj idealoj de pacemo kaj frateco, kiujn ĉiu vera esperantisto adoras.

Kvankam tiu ideo rajtas nian altestimon, tamen al ĝi kontraŭas la pretendo, ke nia lingvo estu uzebla por ĉiuj sciencoj, ĉu natursciencaj, ĉu sociaj, ĉu filozofaj. Grava tasko estas, pruvi ĝian aplikeblecon je ĉiuj kampoj de la kultura vivo - sen ia ajn escepto.

Konstatas nun, ke tiu escepto ekzistas. Certe oni povus serĉi kaŭzon, sed tiu cerbumado ne rezultus; ĝi kondukus en sferojn politikajn aŭ eĉ ideologiajn, kiuj el si mem nur efikas antagonismon, eĉ malamikecon. Kaj tiu estas vere evitenda. Neskribita leĝo postulas de ni esperantistoj sintenadon nepolitikan, sed fratecan.





Tamen ĉi tie la diskuto estas leviĝinda, ĉu la problemoj, cirklumantaj la historion aŭ kiel scienco aŭ kiel nura literaturo, meritas, ke oni pritraktas ilin. Ĉar ne temas ĉi-loke je filozofaj verkado aŭ disertacio, kiu eble finiĝas je nerefuteblaj, sofistikaj tezoj, oni devas permesi provon, prezenti la historion laŭ ĝiaj nekontesteblaj faktoj, agadoj - precize : laŭ tio, kio vere okazis antaŭ kiom ajn jaroj, kiam ne gravis, ĉu la agintoj al ni plaĉas aŭ ne. Lasu preterpasi ilin antaŭ nia spirito, kiel la granda germana historiisto *Leopold von Ranke* elparolis ; "Ni volas prezenti la homojn tiel, kiel ili agis dum sia tempo!"

Grandiozan ideon eksplikis tiu eminentulo. Supererae lia vidmaniero reliefigis la tutmondan eventaron. Sen iaj ajn sentoj, sen iaj plaĉivolaj sintenadoj, sed sole objektive, laŭfakte oni prezentu tiujn homojn, vivintajn antaŭ ni, ĵus kiel ili pensis, agis, timis kaj ĝojis, fidelaj al cirkonstancoj, kiuj devigis ilin, agi tiamaniere kaj ne alie.

Tamen ĉi tiu provo, prezenti historiaĵon al la tutmonda esperantistaro, postulas klarigi, kiel ĉi tiu historia verko strukturiĝas, kiel ĝi determinas siajn unuopajn partojn detale unu de la alia. Estas necese por oni, konsciiĝi pri la ebla sistemo, kiu difinas ĝian sencon kaj celon.

La plej grava principo, donanta la strukturon, estas ke science sistema kaj kronologia prezentado ne estas ebla kaj aspirinda, ĉar ĝi postulas grandskalan verkon pri la tutmonda historio, tro volumena por esti verkata kaj eldonata. Tia verkaro devus kontentigi la dezirojn ne sole de ĉiu nacio sed ankaŭ de ĉiu homa epoko, de ĉiu kultura periodo; ĝi bezonus tro multe da fortoj por la scienca laboro de unuopa historiisto, ĝi ankaŭ superus la ekonomiajn, financajn kapablecojn de Esperanto eldonejo.

Tiasence aprobinda maniero limiĝu je certa elekto, kiu el si povus permesi enrigardon en la tuthistoriajn eventojn, kiuj emociis la homaron de post iaj ajn tempoj.

Kia do estu la elekto, ĉu hazarde arbitra aŭ laŭ certaj historiaj konformoj? Tiel ekestas dua principo, difinanta la elektadon. Ĉar

arbitreco kondukus al malordiga prezentado, kiu ĉiun historian interesiĝanton ne nur ĝenus sed ankaŭ detenus, legi la verkon. Certa ordo do devas regi ĉi tiun elektadon.

Tiel tiu dua principo devas konsideri ĉiujn historiajn epokojn, nenion ellasante. Samsence ne ĉiuj nacioj, popoloj aŭ landoj povas prezentiĝi laŭ iliaj gravecoj, reliefigantaj la historian procedon. Do, certe evidentiĝas aliflanke, ke unuopaj homaj grupoj kaj socialigoj ne formas la historiajn procedojn, ĉar ili efikas tiujn procezojn kune kun aliaj, plenumante ideojn politikajn, ekonomiajn aŭ filozofajn, starantajn super ili kiel mistera regado de eternaj aŭtoritatoj.

El tia konsiderado rezultas la postulo, ke ĉiu prezentado devas ligi minimume du ŝtatojn aŭ popolojn; plej ofte la eventoj koncernas plurajn da ili. Bedaŭrinde ili karakteriziĝas je milito aŭ aliforma perforteco. Kiel abomeninda por ĉiu vera esperantisto, sed ne evitebla.

Plua konsiderado kondukas al problemo, jam de ĉiam okupanta la historiistojn, eĉ la plej famajn: Kiu estigas la historion ? Ĉu tiuj estas homoj, elstarantaj laŭ ilia granda aŭtoritato? Aŭ ĉu regas misteraj aŭtoritatoj, starantaj super la surtera agado?

Kiam oni studas diversajn historiaĵojn, ekz. la reformacion de la 16a jarcento, aŭ la germanan nacisocialismon, oni ne povas ne rigardi al la eminentaj personoj, kiuj strikte ligiĝas kun tiuj historiaĵoj - en tiu kazo estas d-ro *Martin Luther*, resp. la ,kondukisto' *Adolf Hitler*. Preciza analizado permesas la konkludon, ke en la plej oftaj kazoj la aŭtoritatuloj efikas la historian procezon, kaj ne inverse. Al sia tempo ili indikas kiel stampilo la vivmanieron multflanke, kondukante kaj montrante la estontan historian procezon.

Tiel indikata estas la maniero de la historia prezentado ĉi tie aplikata. Kiam, zigzage tramarŝante la historian eventaron, ni varias la epokojn de pli proksimaj tempoj al pli malproksimaj, tiam per tio estas evitata, ke enuo akompanas la prezentadon kaj ke evidentaj tempaj interspacoj rimarkiĝas kiel historia malpleno, rezultanta laŭ la ĉi tie farata elekto.



Fine ankoraŭ certa rimarko estu eksplikata, koncernanta la unuan historiaĵon. Kvazaŭ prototipo ĝi karakterizu ambaŭ diritajn tezojn: kaj la elektomanieron kaj la veran emociantan historiecon. Tio okazu en la persono de la granda burgunda duko Karlo la Temerara.

Kvankam li kreskis el epoko, kiu ilustris la nobelecon de la kavalirismo, li fariĝis la unua moderna monarko, administranta sian regnon zorgeme. Unuflanke li agis honeste laŭ la reguloj de suverano, vivis kuraĝege kiel nobelulo, konante decon kaj bonajn virtojn, sed aliflanke ruzaĵojn kaj insidojn li uzis, por atingi siajn politikajn celojn. Rigoron, ekscesantan al krueleco, li uzis, por plenumi sian plenpotencan volon.

Malakordo regis lian animon, ĝis kiam la sorto destinis lin al granda malgajnanto, perdante sian gloran vivon.

Sed laste - tio destinas lian veran grandecon - li naskigis la ideon de la unuiĝanta Eŭropo. Kvankam franca sango fluis en liaj vejnoj, li fariĝis la patro de komuna Eŭropo trans limoj, super nacioj, montrante la vojon al supernacieco, kiun ni hodiaŭuloj deziras, kiun trans esperantismo ni alstrebas, kiun ni esperas.

Tiel, kaptante ideon, emociantan kaj ĉiun fervoran amikon de la historio kaj ĉiun verecan esperantiston, mi transdonas ĉi tiun moderan verkadon al vasta legantaro, kiu eble ĝuos ĝin, sed ankaŭ lernos el la pasinteco por plenpaca estonteco. Tio estu mia deziro.

Adreso de la autoro:
Gerhard KALKHOF
An der Ritsch 17
DE - 36341 LAUTERBACH
GERMANIO